# *Raúl Castro kaj Díaz-Canel prezidis solena?on okaze de la Nacia Ribela Tago*



**Ceremonio en la placo de Cienfuegos**

Cienfuegos, jul 26  (RHK) La generalo de armeo kaj historia gvidanto de la kuba Revolucio, Raúl Castro, kaj la prezidento Miguel Díaz-Canel, prezidis  la centran solena?on  por la 69-a datreveno de la Sturmoj al kazernoj  Moncada kaj Carlos Manuel de Céspedes.

La provinco de Cienfuegos atingis la sidejon de ?i tiu nacia dato pro siaj rezultoj de socia kaj ekonomia efiko.

La placo de eventoj de Cienfuegos, anta? la moleo de la urbo situanta en la centrosuda regiono, gastigas la memorfeston de la nacia datreveno.

?eestis anka? la kuba ?efministro, Manuel Marrero, membroj de la Nacia kaj Provinca Partia Sekretariejo, membroj de la Politika Buroo, kaj protagonistoj de la historia faro de la 26-a de julio, membroj de la amikeca karavano Usono-Kubo, Pastroj por paco.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/294686-raul-castro-kaj-diaz-canel-prezidis-solenajon-okaze-de-la-nacia-ribela-tago

**Radio Habana Cuba**